

NOVEMBRO  
DECEMBRO  
1977

109

(6)

hejs  
hejs  
hejs  
hejs

# UNIVERSALA DEKLARACIO

de

HOMAJ RAJTOJ

ATENCOJ KONTRAŬ

LA HOMAJ RAJTOJ

LA 10-a ĜENERALA ASEMBLEO DE UNUIĜINTAJ ESPERANTISTOJ akceptis kaj proklamis la Universala Deklaracion de Homaj Rajtoj kiel la ĉefa teksto en la venontaj paĝoj de la historia agado. La Asembleo alvokis ĉiujn membrojn publikigi la tekston de la Deklaracio kaj "fari, ke ĝi ne disvastigu, sed pligrandigu kaj komentu, kaj ĉefe pernejoj kaj metodoj de instruado, sur la bazo de la politika stato de landoj aĝantaj ĝi."

ESPERANTA TRADUKO

ATESTITA DE UNIVERSALA ESPERANTISTO

1976



# ENHAVO

MALFERMITA LETERO AL LA MEMBRARO PRI LA STATUTO-PROONO .....	3
PROJEKTO DE STATUTO POR HISPANA ESPERAN- TISTA JUNULARA SOCIETO .....	4
INTERNACIA KONFERENCO PRI LA KULTURA IMPERIISMO .....	8
ATENCOJ .....	15
LA ĈASO .....	17
NI REKOMENDAS ....	20

---

HEJS - Novembro-December 1977

N-ro 109 (6) - 19a Jaro

INTERNA BULTENO ORGANO DE HEJS

(HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO)

Junulara Sekcio de HEF - Landa Sekcio de TEJO

Gral. Mola, 99, 1r - Apartat 407

SABADELL (Barcelona) - Hispanio

Konto n-ro 15049-56 en Banc de Sabadell

Prezidanto: Ludoviko de Yzaguirre

Ĉefredaktoro: Oskar Puig i Cánovas

Presita en "L'Eina" - Dip. Legal. B.6519-1977

PRI LA SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ, RESPONDECAS

NUR LA AŬTORO. KAJ PRI ĈIO ALIA, RESPONDECAS

LA ESTRARO KAJ LA REDAKCIO DE HEJS.

## MALFERMITA LETERO AL LA MEMBRARO PRI LA STATUT-PROPONO

Karaj kunsocietanoj,

La celo de ĉi-sekvaj alineoj estas klarigi, kial la estraro proponas, en tiu ĉi sama numero de nia Bulteno, Statuton por HEJS.

Fakto estas, ke ĉe la pasinta kongreso de HEF last-somere la cirkonstancoj ege ŝanĝiĝis, ĉar HEF aprobis nian proponon, ke HEJS fariĝu aŭtonoma. Tio signifas, ke la prezidanto de HEJS ne plu estos elektita aŭ prezidintigita de HEF-estraro, sed de nia membraro aĝa ĝis 30 jaroj. Pro tio la REGULARO de HEJS ne plu utilis, ĉar ĝi priskribis la funkciaĵon de la asocio laŭ la principo, ke ĝi ne estas aŭtonoma. Krome, al tia sekcio, kia ni nun estas, pli taŭgas ellaborita statuto ol simpla REGULARO. Tial, ni decidis ne anstataŭi ne plu taŭgan regularon per iom ŝanĝiginta regularo, sed per tutnova statuto, kiu prezentas apartajn trajtojn.

La ĉefaj celoj de la estraro estas atingi demokratecon, pliproksimigon al la bazo, plifortikigon de la lokaj grupoj, funkcieblacon kaj fine klarigon de membrakategorioj. Ne bezonatas klarigi kial, sed kiel ni serĉis demokratecon. Tio estas celante, ke, per la strukturo de la societo, ĉiu membro partoprenu rekte aŭ malrekte en ĝia entendo. Tial ni kreis, laŭ la modelo de TEJO, UEA kaj multaj aliaj Esperanto-organizaĵoj, komitaton, kiu estas la plej supera organo de la societo kaj kies plenuma organo la estraro estas. Precize per tiu komitato ni esperas atingi pliproksimigon al la bazo, ĉar ĝiaj membroj estas elektitaj de la diversaj grupoj laŭ ili a membronombro. Per tio ni celas ankaŭ plifortikigi la lokajn grupojn kaj asociojn de nia junularo, rekonante ilian gvidan rolon en la laborado de nia societo. Alia ĉefa celo, kiun ni prezentis al ni, estas, ke la Statuto estu funkciebla, t.e., ke ĝi ne submetu la gvidorganojn sub tiom da burokrataĵaj komplikadoj, ke ili neniam kapablu labori. Ekzemple: grava bremsilo de la laborado estas tio, ke oni multfoje devu okazigi per-poŝtajn balotadojn aŭ ĝeneralajn asembleojn, kiuj kutime ne atingas bezonatan kvorumon. Tial la komitatanoj, kiel reprezentantoj de la grupoj, kapablos dinamike laborigi la societon laŭ la desiroj kaj proponoj de la grupoj de ili reprezentitaj. Finfine ni celis, kiel okazas ekzemple inter TEJO kaj UEA, ke la kategorioj fontantaj el la aĝo restu klare apartigitaj.

Jen nia peto: atente tralegu ĝin, serĉante kiamaniere ĝi estas pli bonigebla, ĉar estas dezirinde, ke tiu ĉi statuto daŭru, kiel eble plej longe. Ĉiuj amendo-proponoj atingu nin ĝis la 31-a de Januaro de 1978. Por proponi amendon, vi devas menci i la artikolon kaj proponi vian tekston laŭ-vorte. Ni publikigos en nia venonta bultenco (post tiu-ĉi dato) ĉiujn proponojn pri amendo kaj samtempe sendos al vi voĉdonilon pri ĝi, tiel ke proksimume en la monato Aprilo ni havu la rezultojn.

Kiel adiaŭo, mi ripetas al vi kritike legi la proponon, tial ke vi povu opini pri ĝi sen supraĵe flati aŭ kontraŭstari nin. Nome de la estraro, saluton de,

Ludoviko de Izaguirre  
Prezidanto de HEJS

## PROJEKTO DE STATUTO POR HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO

### I.- ĜENERALAJ PRINCIPOJ

- 1.- Nomo. La nomo de la organizo estas Hispana Esperantista Junulara Societo, mallongigite, HEJS.
- 2.- Statuso. HEJS estas junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj landa sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).
  - 2.2. La estraranoj de HEJS estas en daŭra kontakto kun tiuj de HEF kaj TEJO per reciproka komunikado.
- 3.- Konsisto. HEJS konsistas el membrigintaj asocioj kaj individuaj membroj.
- 4.- Celoj.
  - 4.1. La celo de HEJS estas disvastigo kaj plifortigo de la ideo de lingvo internacia kaj, pli konkrete, de Esperanto, precipe en junularaj medioj.
  - 4.2. Rimedoj:
    - 4.2.1. Informado pri la internacia lingvo.
    - 4.2.2. Praktika utiligo de la internacia lingvo je la servo de la junularo.
    - 4.2.3. Okazigo de renkontiĝoj.
    - 4.2.4. Preparado de la membraro al aktiva partopreno en la ĝenerala Esperanto-movado.
  - 4.3. HEJS konsideras bazon de sia agado la aktivan strebado al respekto kaj plenumo de la Homaj Rajtoj kaj de la Rajtoj de la Popoloj.
- 5.- Sidejo. HEJS sidejas en Sabadell, strato General Mola, 99.
- 6.- Lingvo(j). La oficiala lingvo de HEJS estas la lingvo Esperanto, tial ĝi estas difinita per sia Fundamento kaj per sia verkaro. Labora lingvo povas esti kiu ajn.

### II.- MEMBRARO

#### 7.- Membrokategorioj.

- 7.1. HEJS havas asociajn kaj individuajn membrojn, kiel ankaŭ honorajn membrojn, honorajn prezidantojn kaj subtenantojn.
  - 7.2. Asociaj kaj individuaj membroj povas esti gejunuloj, ne atingintaj la aĝon de tridek jaroj. Escepte, la membroj de la gvidorganoj de HEJS povas esti maksimume du jaroj pli aĝaj. La aĝo de honoraj membroj, honoraj prezidantoj kaj subtenanto ne estas limigita.
  - 7.3. Asociaj membroj estas la membroj de la aliĝintaj Asocioj aŭ Organizoj, konformaj al la aĝolimo difinita en la artikolo 7.2., kaj por kiuj la koncerna asocio aŭ organizo pagas la specifan jaran kotizon.
  - 7.4. Individuaj membroj estas tiuj, kiuj apartenas al neniu asocio aŭ organizo aliĝinta al HEJS.
  - 7.5. Kiel honoraj membroj povas esti elektitaj personoj, kiuj faris gravajn servojn al la junulara Esperanto-movado. Kiel honoraj prezidantoj povas esti elektitaj nur personoj, kiuj, krome, havis eksterordinarajn meritojn por HEJS.
- 8.- Asocioj aŭ Organizoj aliĝas al HEJS post akcepto de ties Komitato.
  - 9.- Eksiĝo kaj eksigo.
    - 9.1. Pri la eksigo kaj eksigo de individuaj membroj, honoraj membroj kaj honoraj prezidantoj, kompetentas la Komitato.
    - 9.2. La eksigo de la aliĝintaj asocioj kaj organizoj devas esti skribe deklarita. Ĝi validas de la fino de la administracia jaro.

- 9.3. Aliginta asocio aŭ organizo, kiu malgraŭ skriba averto ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksiginta.
- 9.4. Membroj kaj aligintaj asocioj aŭ organizoj kiu evidente kontraŭlaboras la celon de HEJS aŭ nekontentige plenumas siajn devojn al la organizo, povas esti eksigitaj laŭ decido de la Komitato.

#### 10.- Subtenantoj.

- 10.1. Subtenantoj estas organizoj aŭ personoj, kiuj, simpatiante al HEJS, finance helpas ĝin.
- 10.2. La Komitato de HEJS akceptas subtenantoj, por kiuj ĝi fiksas specialan kotizon.

### III.- ORGANOOJ

#### 11.- Komitato

- 11.1. La supera instanco de HEJS estas la Komitato kiu konsistas el:
  - 1.1. Komitatanoj A, reprezentantaj la aligintajn asociojn aŭ organizojn, elektataj de ili.
  - 1.2. Komitatanoj B, elektataj far la tuta Komitato, en maksimuma nombro de unu kvarono de la komitatanoj A.
- 11.2. Ĉiu aliginta asocio aŭ organizo kun almenaŭ 5 aktivaj membroj rajtas al komitatanoj laŭ jena proporcio:
 

kvin	ĝis dek unu	.....	unu komitatano
dek tri	ĝis dudek	.....	du komitatanoj
dudek unu	ĝis tridek	.....	tri komitatanoj
tridek unu	aŭ pli	.....	kvar komitatanoj.
- 11.3. Por certigi al HEJS la kurlaboron de spertuloj, la Komitato povas elekti komitatanojn B, ĝis maksimuma nombro de kvarono de la komitatanoj A, post certigo de ilia proceco kurlabori efike la agadon.
- 11.4. Ĉiuj komitatanoj devas esti membroj de HEJS. Ĉiuj komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj.
- 11.5. Komitatano A, kiu ne povas partopreni kunsidon de la Komitato, devas nomi anstataŭanton, skribe aprobitan de la koncerna asocio. Kaj la anstataŭita komitatano, kaj la anstataŭanto devas esti membroj de HEJS; la anstataŭanto havas dum la koncerna kunsido la samajn rajtojn kiel ĉiu alia komitatano. Komitatano B ne estas anstataŭebla.
- 11.6. La Komitato:
  - 11.6.1. Elektas prezidanton, unu aŭ du vicprezidantojn, ĝeneralan sekretariojn, estraranon pri financoj, kaj laŭ necesoj, pluajn estraranojn;
  - 11.6.2. Rajtas elekti honorajn membrojn kaj honorajn prezidantojn;
  - 11.6.3. Difinas la ĝeneralan agadon de HEJS.
  - 11.6.4. Decidas pri la aliĝo kaj eksigo de asocioj;
  - 11.6.5. Decidas pri regularoj;
  - 11.6.6. Disponas pri la monsumo, pri kiu ĝi rajtas memstare decidi;
  - 11.6.7. Diskutas kaj aprobas la jarbilancon kaj la buĝeton.
  - 11.6.8. Akceptas subtenantojn, kiaj difinitaj en artikolo dek, kaj fiksas iliajn kotizojn.
  - 11.6.9. Decidas pri la agado de la estraro.
  - 11.6.10. Decidas pri la aferoj ne rezervitaj al aliaj organoj, rajtas decidi en ĉiuj aferoj pri kiu kompetentas la estraro.

## 12.- Estraro

- 12.1. La estraro konsistas el membroj difinitaj en artikolo 11.6.1., kaj estas elektata ĉiun jaron.
  - 12.2. La estraro:
    - 12.2.1. Plenumas la decidojn de la Komitato.
    - 12.2.2. Nomas la redaktoron de la bulteno de la organizo.
    - 12.2.3. Decidas pri la loko kaj la tempo de la kunvenoj kaj renkontiĝoj.
    - 12.2.4. Kreas novajn servojn.
    - 12.2.5. Respondas pri financoj de HEJS antaŭ la Komitato.
  - 12.3. La prezidanto reprezentas HEJS-n kaj subskribas kun la ĝenerala sekretario la ĉefajn dokumentojn, prezidas la komitaton, la estraron kaj la kunvenojn de HEJS.
  - 12.4. La vicprezidantoj, laŭnecese anstataŭas la prezidanton.
  - 12.5. La ĝenerala sekretario zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la komitato kaj de la estraro, kunmetas la jaran raporton pri la laboro de HEJS.
  - 12.6. La estrarano pri financoj administras la monaferojn de HEJS.
  - 12.7. Ĉiuj estraranoj plenumas laŭbezone komisiitajn taskojn.
- 13.- La redaktoro plenumas siajn redaktajn taskojn laŭ la ĝenerala gvidlinio difinita de la Komitato kaj respondecas al la Estraro.
- 14.- Komisionoj kaj komisiitoj. En la kadro de sia kompetenteco, la Komitato aŭ la Estraro povas elekti specialajn komisionojn aŭ komisiitojn por esplori iujn problemojn aŭ por plenumi difinitajn taskojn. Post la plenumo de la tasko, ĉiu komisiono aŭ komisiito devas skribi raportoj al la elektinta organo.
- 15.- Labormaniero de la organoj.
- 15.1. La Komitato kaj la Estraro kunvenas almenaŭ unu fojon jare, laŭbezone.
  - 15.2. En la voĉdonoj, validas la plimulto de la voĉdonintoj. Okaze de voĉegaleco decidas la prezidanto de la koncerna organo. Decidoj, kiujn partoprenis malpli ol duono de la rajtintoj, devas esti submetita al skriba voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonantoj. Funkciulo sin detenas de voĉdono pri aferoj, kiuj koncernas lin persone.

## IV.- FINANCOJ

### 16.- Enspezoj. Ĝia utiligo.

- 16.1. La enspezoj de HEJS konsistas el:
  - 16.1.1. Membrokotizoj.
  - 16.1.2. Monprofito de la agadoj de la organizo.
  - 16.1.3. Donacoj, heredaĵoj kaj subvencioj.
- 16.2. La enspezoj estas utiligataj por kovri unue la enbuĝetitajn elspezojn kaj la administradon de HEJS.


## V.- ĜENERALA VOĈDONADO

### 17.- Okazigo

#### 17.1. Ĝi okazas:

- 17.1.1. Se la komitato, aŭ, okaze de urĝeco, la estraro, tion decidas.
- 17.1.2. Se aliĝintaj asocioj aŭ organizoj reprezentantaj kvaronon de la membraro ĝin postulas per sia skriba subskribo, en tempolimo de tri monatoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta skriba postulo.
- 17.1.3. Se kvarono de la individuaj membroj ĝin postulas per sia skriba subskribo, en tempolimo de tri monatoj kalkulita de la unua ĝis la lasta skriba postulo.

- 17.2. La ĝenerala sekretario ĝin aranĝas plej malfrue du monatojn post ricevo de sufiĉa nombro da subskriboj.
- 17.3. Tiu voĉdono esprimas sin pri demandoj submetita de la instanco, kiu postulis la ĝeneralan voĉdonon.
- 18.- Kalkulo de voĉoj
- 18.1. Ĉiu aliĝinta asocio aŭ organizo havas nombron da voĉoj egalan al la nombro de la asociaj membroj, por kiuj la kotizo jam estas pagita je la dato de aranĝado de la voĉdono.
- 18.2. La individuaj membroj voĉdonas individue, Ĉiu membro rajtas al unu voĉo, kiu ne povas esti delegita al alia persono nek organizo.
- 18.3. En la voĉdono validas la plimulto de la esprimitaj voĉoj. Por ŝanĝi la statuton aŭ dissolvi la organizon, necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentu minimume la duonon de la membraro.
- 19.- Kontrolo. La ĝenerala voĉdono estas skriba, kaj la voĉoj estas kalkulitaj 45 tagoj post la forzado de la voĉdoniloj. La voĉdonilojn kalkulas persono proponita de la instanco, kiu postulis la ĝeneralan voĉdonon, en ĉeesto de tri membroj nomitaj de la komitato de HEJS. Ĉiu kontrolinto skribe certigas la ĝustecon de la proceduro.
- VI.- ŜANĜO DE LA STATUTO
- 20.- La komitato de HEJS kompetentas pri ŝanĝo de ĉi-statuto. Pri la statutsanĝoj, la ĝenerala sekretario de HEJS informas la estrarojn de HEF kaj de TEJO, kiuj plej malfrue dum la sekvonta kunveno komunikas tion al sia komitato. Statutsanĝoj, tussantaj ankaŭ la statutojn de HEF aŭ de TEJO validas nur post la aprobo de ilia kompetenta organo kiu decidu pri tio, plej malfrue du monatoj post la decido de la komitato de HEJS.
- 21.- Provizoraj reguloj. Per la akcepto de tiu ĉi statuto ĉesas validi ĉiuj reguloj kiuj kontraŭas la principojn kaj regulojn de ĉi statuton.



# internacia konferenco pri la kultura imperiismo

Alĝero, 11-15a de oktobro 1977

LA LINGVA SUPERREGADO. Politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj aspektoj de la nuna situacio kaj proponoj por forlasi ĝin.

Fare de Prof. Fabricio Penakietti, Venecia Universitato, Italio.

Mi ja nur konstatas komunajojn, kiam mi rimarkigas, ke la rilatoj inter la diversaj ŝtatoj regiĝas ankoraŭ de la leĝo de pliforto, malgraŭ la bonaj intencoj pri la kuraĝigo de pli bone ordigitaj rilatoj fare de internaciaj organizoj (el kiuj plej grava estas, kompreneble, UNO). Oni volis anstataŭi la rilatojn bazitajn sur la forto de la rilatoj bazitaj sur internacia jura ordo iel komparebla kun la regularoj validaj ene de ĉiu ŝtato inter la civitanoj.

Ververe la nunaj ŝtatoj disiĝas sur proporcia eskalo, kies distribuado estas la konsekvenco de kelkaj esencaj parametroj (kruda nacia produktado, landa vasteco, nombro da enloĝantoj, milita povo, ktp.) kondiĉigas diversmaniere tiujn lokitajn alte (satelitaj ŝtatoj, aliancantoj, ktp.), eĉ se la afero ne estas nura mekanikaĵo kaj pluraj elementoj (precipe la komuneco de socia kaj politika sistemo) determinas konkretan "kiu kondiĉas kiun".

Tiu aro da kondiĉigoj estas ĝenerale konita per pluraj etikedoj, de "hegemonio" ĝis "imperiismo", "koloniismo" kaj "novakoloniismo". Ni uzu ĉi tie la vortojn "hegemonion" kaj "imperiismon" indiferece por nomi la kondiĉaron, kiun ŝtato ricevas de alia ŝtato, subkompreneble evidente, ke fenomenoj kiel la novakoloniismo estas nur specialaj prezentoblecoj de tiuj ĝeneralaj kategorioj. Estas bezonata nepre, posta klarigo. La kondiĉigoj ĝenerale nomataj efektiviĝas de ĉiuj civitanoj de la ŝtatoj "subpremataj", je ilia vivonivelo, je ilia ideologio pri la mondo, kaj tiel plu... sed oni ja ne povas aserti ke ĉiuj civitanoj de la hegemoniaj ŝtatoj kontribuas, aktive kaj konscie, je la plenumado de tiaj rilatoj aŭ profitas el ili. Ku time la klasoj, kiuj havas la povon en ilia propra ŝtato, organizas la imperiismajn politikojn kaj profitas el ili substance.

## Aspektoj de la imperiismo

Kiam ni analizas la manierojn de manifestado de la kondiĉigojn kiujn imperiisma ŝtato imponas sur alian, vidivas kelkajn aspektojn de tiu fenomeno kaj izoligas ilin, kvankam la fenomeno restas unu nura, separebla de analizo nur.

Unu aspekto estas ekonomia.

Kiam akordo, kia multaj subskribitaj post la dua mondmilito, juriĝas ke iaj aviadiloj nur estu produktitaj en Usono kaj ne en Germanio, en Italio aŭ en Nederlando, videblas klarega ekzemplo pri ekonomia hegemonio.

Dua aspekto estas milita.

Kiam la tankoj de la lando A invadas la landon B, aŭ kiam la maraj fusilistoj de la lando C elŝipiĝas sur la landon D por "restarigi ordon", ni pritraktas specifajn ekzemplojn pri milita hegemonio. Ĉiu povas trovi multajn aliajn tute sola.



Alia aspekto, tiu ĉi ankaŭ klare videbla, estas la politika aspekto, striktasense. Praktike ĝi signifas subteni ian reĝimon ene de la gvidata ŝtato, similan al tiu de la gvidanta ŝtato, kaj internacnivela ĝi kunportas la aŭtomatan kunigon de la aliancanoj al la pozicio de la gvidanto.

Ni devas nun averti, ke la nomado de tiuj aspektoj estas la konsekvenco de simpliga bezono rilate al la eksponado. Tia simpligo eble ŝajnas tro kruda, tamen ĝi bonege realas, konsiderante ke ĉiufoje la tri aspektoj ne same fortas. Kelkfoje jam sufiĉas la ekonomia kondiĉigo por kontroli unu landon, sen la bezono de la milita agado, kaj permesante etajn eksperimentojn en la socia-politika sistemo. Aliffoje la politika-milita kondiĉigo ne kunportas signifajn ekonomiajn avantaĝojn.

Certe kaj sendube, la politikaj, militaj kaj ekonomiaj intervenadoj kunhelpas sin kaj fortigante unu la efikon de la aliaj, utilas ĉiuj al la sama fino. Krome, ili ĉiuj estas facile rekoneblaj, kiel kongrutas ja ĉiuj, kiuj iomete atentis pri internaciaj okazaĵoj.

Ŝajnas kontraŭe, ke eĉ inter malcerto kaj reiroj estas rifuzata je la teoria nivelo la bezono de la subpremado de la naciotoj far la naciego. Teorioj pri "elektitaj rasoj", "ju naj popoloj", "gvidantaj ŝtatoj", ĝenerale pri ĉiaj "gardistoj", perdas gravecon, feliĉe, kaj ni devas esperi ke praktike ili perdu baldaŭ tiun gravecon kio, ideo, jam ne plu ekzistas.

#### Kulturo kiel subtenilo de imperiismaj politikoj

Unu el la aspektoj de la imperiismo ne estis tamen ĝis ĵus sufiĉe ofte izoligita kaj taksita je ĝia vera valoro: la kultura aspekto.

Ekde kiam oni parolas pri kulturo oni subkonscie ekpensas pri alia mondo, kaj volonte ĉio estas nobligita kaj idealigita. Tial pri kulturaj internaciaj rilatoj oni volonte diras belaĵojn pri "internacia kunlaboro", pri la "pretigo al la disponado far' de aliaj de sia propra kulturo", pri "helpo al la disvolvigo", ktp.

Kaj, ankoraŭ pli surprize, oni ne nur parolas tiel, sed oni ankaŭ kredas ke tia estas la vero; tion kredas ankaŭ la intelektuloj, t.e. tiuj, kiuj faras el la kulturo metion.

Sed ne multe malfacilas, se oni tion volas, renkonti plurloke kaj plurmaniere specifajn kadrojn de kultura politiko celantajn al la impono de la kulturo de la hegemonia ŝtato sur la aliaj.

De la tempo de la roma imperio kiu, kiel iuj ŝatas ankoraŭ ree ripetiti, alportis juron kaj lingvon al la konita mondo, ĝis la tempo de la mondaj blokoj kaj de la oponentaj kaj kulture sendependaj landoj, ĝuste la sama logiko prezidas la decidojn pri politika kulturo.

La kulturo de la ŝtato, kiu efektivigas ĝian hegemonion, estas imponata al la aliaj per unusensa proceso, kiu malofte kaj escepte akceptas malsensajn kontribuojn.

Ĝi estas imponata ĉiel, sed ĉiam pro konsciaj politikaj decidoj kaj ne pro "naturaj" rezultoj el la "proceso de kunveno de popoloj", de la "malgrandiĝo de la mondo", kaj similaĵoj. Ĝin imponas la adopto de kelkaj specifaj lernejoj programoj, la importado de radiaj kaj televisiaj programoj, de ĵurnaloj, de libroj, la pliigo de "kulturaj interŝanĝoj" (erariga esprimmaniero kiu ofte kaŝas nur la sendaĵo de civitanoj de la gvidata ŝtato al la gvidanta ŝtato por konstatiti persone la mirakloj de la progreso.

Kial tia penado por eksporti sian propran kulturon? Certe ne pro filantropio, sed pro longa listo de avantaĝoj por la eksportistoj.

Unua avantaĝo estas nure ekonomia. La libroj, filmoj, televisiaj programoj, elpensaj patentoj... venas el la produktocentroj en Usono, Parizo, Moskvo, kaj ili estas acetataj de la aliaj. Tio cetere permesas la ĉiam pli grandan disvolvigon de la kultura industrio de la hegemonia ŝtato, kiu devenas, do, ankoraŭ pli kapabla imponiĝi sur tiun de la tributanta lando.

Ni trastudu kelkajn konitaĵojn:

Tridek du disvolvigitaj landoj - Okcidenta kaj Orienta Eŭropo, Sovet-Unio, Usono, Kanado, Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Japanio- kiuj enhavas malpli ol unu trionon de la monda loĝantaro, produktas 80% da la libroj publikigitaj poĵare.

Estas kalkulita surbaze de la jaro 1965 ke el ĉiuj kvar libroj venditaj en Afriko, nur unu estis surloke produktita kaj tri estas nekontinentaj. La totala kvanto de tiuj importadoj atingis 64 milionoj da dolaroj. Ni aldonu al tio la aŭtorajn rajtojn, kiujn la malfortaj landoj pagas al la fortaj landoj pro la tradukado de libroj en siajn lingvojn.

Tia fenomeno koncernas precipe la landojn kiuj, kvankam kulture tri butsubpremitaj de aliaj, havas altdisvolvigitan nacian kulturon. Pli ol 70% de la tradukoj venas el la angla, franca, rusa kaj germana. Dum 1968 estis tradukataj en Japanio 2147 librojn japanen, sed la tradukoj de la japana alilingven estis tutmonde nur 77. La malekvilibro ne povus esti pli evidenta.

Alia parte eĉ la elekto de la lingvoj, el kiuj oni tradukos klare ko<sub>2</sub> relativas al la politika situacio de la lando, kie oni tradukos.

Jen ekzemple tabelo de la procentoj de tradukaĵoj el diversaj lingvoj, kio koncernas Svedujojn kaj Bulgariojn, memkomentebla.

<u>Lingvo el kiu oni tradukis</u>	<u>Svedujo</u>	<u>Bulgario</u>
angla	67.2%	7.1%
franca	6.8%	5.9%
germana	8.0%	6.8%
rusa	2.0%	33.6%
aliaj lingvoj	16.0%	46.5%

Ni ne opinias necesan aldoni nombrarojn el la aliaj terenoj (eksportado da sondiskoj, filmoj kaj televisiaj spektakloj). Sufiĉas ke iu interesata ŝaltu la radioaparaton, oniru sondiskej<sub>2</sub>on aŭ kinejon. Ĉiu povas tutsole, se li aŭ ŝi deziras tion, ekkonscii pri la avantaĝoj el kiuj la imperiisma lando profitas kaj kiuj naskiĝas el ĝia kultura imperio aliaĝadkampe (sciencia esplorado kaj sekva "forkurado de cerboj", dissendado de novaĵoj pere de ĵurnalaraj agentejoj...) rememorante ke, momente, ni parolas nur pri avantaĝoj mezureblaj per tujaj monokvantoj. Sed ekzistas ankaŭ aliaj avantaĝoj por la eksportanta lando, esence konsistas je eksportado de tia sia imago, memkompreneble naskiĝiganta eksteran aprobon.

La hegemonia lando kreas ekstere imagojn de evoluigita lando kaj igas la ricevintojn admirantoj aŭ almenaŭ enviantoj. Tio eble ne influas la sintenon de la civitanoj de la tributa lando, kiuj akceptas pli kaj pli la valorojn validajn en la alia lando kaj intencas, konscie aŭ ne, adaptiĝi al ili.

Kompreneblas, ke tiam la homoj ne tiom emas al la ribelo kontraŭ aliaj imponadmanieroj, ekzemple ekonomia, milita, politika, ktp... Se vi demandus al senegalano, kial li intencas vestiĝi kia franco, li respondus, ĉar tia estas la moderna vestemo.

Ni ankaŭ ne kredas valoran multe insisti pri la lavango el informoj favoraj al la politika kaj socia sistemo de la gvidanta lando, kiu farĉas la ĵurnalojn, filmojn, librojn, ktp. Ĉio tio, tamen, priokupas nin ĉar ĝi ne devenas el la libera elekto de la influigitaj homoj. Se iu decidus konformiĝi je la usona, rusa aŭ ĉina modelo, per si mem kaj plenkonscie, kaj orientiĝas do al tiaj kulturaj inklinoj, ni ne trovas tie negativan faron nek kial ni por malpermesi ĝin. Fundamente Komparado kun aliaj kulturoj gravas kiel ero el la ilaro por la progresiĝo de la homaro kaj ni ne subtenas la kulturan aŭtarkion.

La maltrankviligantaĵo troveblas tamen je la procedo por elekti la kulturon, kun kiu oni kompariĝas, elekto farita de iuj por la granda amaso kaj la aliaj kaj neniel celanta al la interŝanĝoj inter diu versaj kulturoj. La kultura politiko estas konklude nur ilo de la registaroj por iliaj celoj. Ĝi eniras la aspektaron de la imperiisma politiko, akordita kun la ceteraj aspektoj, kiujn ĝi subtenas, almenaŭ per la idealigo de la rilato gvidanto-gvidato kaj ties superrestruktura justigo.

### La rolo de la lingvo

Kia estas la rolo de la lingvo en tiu problemoj? Laŭ ni, fortega ilaro forto. Lingvo estas fakte la precipa vojo por la kulturo. Kvankam abstrakte ĉiu lingvo ne estas pli ol kodo por la komunikado farita el morfemoj, ktp. iamaniere ordonitaj (tion instruas al ni ĉiuj lingvistoj), kaj tial lingvoj kiel iloj estas teknikaj, puregaj, ne malveras ke ĉiu lingvo estas ligita al bone determinita homa grupo kaj al ĝia kulturo (tion instruas al ni ĉiuj sociolingvistoj).

La lingvo kaj la kulturo esprimata en ĝia lingvo progresas do kun kune kaj evidente ia ajn eksterena kultura politiko ne estas separebla de ĝia lingva politiko.

Ĉiuj kulturaj imperiismoj komencas imponante sian lingvon, kiel lingvo lernenda de la tributanta-ŝtatanoj kaj uzenda de ili por paroli kun parolantoj de aliaj lingvoj.

Evidente tia operacio estas pli aŭ malpli bone kaŝita, helpita de la kutimaj fumaj kurtenoj, kiuj izoligas la lingvajn faktorojn en apartejon ne tuŝitan de la tuttaga vivo, kaj kiuj aldonas al la decidoj pri lingva politiko "for de ĉia suspekto"-aspekton.

En Afriko oni asertas, ke la loka lingva problemaro estas tro komplika por esti solvata kaj tial, afrikanoj nur povas forĵeti en la maron iliajn lingvojn kaj lerni la anglan kaj la francan, iloj de progreso kaj evoluigo (pensadu ni ĉiam, ke forlasi sian lingvon favore al alia signifas baldaŭ forlasi sian kulturon favore al la alia)

En landoj apartenantaj al la tiel-nomita okcidenta bloko, ekzemple Italio, Japanio kaj ankaŭ Suda Koreo kaj Brazilo la angla lingvo estas imponita de jam la fino de la dua mondmilito pro konsideroj rpi efiko rilate al la profito je la lernado de la angla (oni povas paroli kun multe pli da homoj kaj kun la homoj kiuj gravas sci ence, ktp...). Malofte oni trovas ĉi tiam deklarojn montrantajn la krudan realon, tio estas, ke la angla estas la lingvo de Usono, venkinta en la milito kaj efektiva sian hegemonion en tia parto de la mondo.

En landoj de la Orienta Eŭropo la lernado de la rusa (same decida en la lernejo kiel la angla ĉe ni) estas oficiale prezentata kiel "objektivan bezonon en la nuna fazo de la konstruado de la socialismo", responde al la "natura atrakto fare de la kulturo de la popolo, kiu unue faris la revolucion", "karakterata trajto de la kunlaborado kaj ilo por la kunintegrado de la frataj socialismaj landoj" ktp. Tamen malfacilas elĉerpi malsamajn konkludojn el kondiĉoj, kiuj tute samas.

La lingva politiko do, kaj pli specife la politiko de la fremdaj lingvoj disvastigataj en la diversajn landojn, logikas precize kaj, surprizega surprizo, ĝi estas intrinseke ligita al la ceteraj politikaj aspektoj de la gvidantaj kaj gvidataj landoj.

Mi invitas vin pripensi kaj klopodi solvi la kialoj de tiuj ĉi tri faktoj:

- En Orienta Germanio oni lernas la rusan en ĉiuj lernejoj, dum en Okcidenta Germanio oni lernas la anglan.
- En Alĝerio la araba anstataŭas la francan en la lernejoj multe pli rapide ol en Tunezo; la sama okazas en Tanzanio rilate al Kenja, parolante pri la ŝahilio kaj la angla.
- En Italio la angla multege pli gravas ol la germana aŭ la araba, malgraŭ la intensaj turismaj-komercaj rilatoj kun Germanio kaj tio, ke iel ĝin dirante, la arabalingvaj landoj estas apud la italiaj landlimoj.

Pro pluraj kialoj ni parolas en ĉi tiu raporto nur pli la lingvaj-kulturaj rilatoj inter ŝtatoj. Tamen eĉ ene de ĉiu ŝtato ekzistas problemoj tute analogiaj, kiam okazas komunikado inter la diversaj popoloj samŝtatanaj. Ankaŭ tiam la plej forta lingva grupo imponas sian lingvon kaj kulturon al la minoritatoj.

Ankaŭ validas la leĝo de pliforto. La tuto estas poste komplikigata de la konceptoj pri la ŝtato kiel io sanktega kaj netuŝebla, kaj sekve ia ajn klopodo pri reago kontraŭ la superreganta etnio facile tradukeblas en atencon kontraŭ la ŝtat-nacia unueco, ktp...

#### Ĉu al la ekkorektado de la nuntempa situacio?

Ni analizu antaŭ ĉio la reagojn al la priskribita situacio.

Favoraj al la daŭrigo de la nuna situacio estas ĉiuj registaroj kaj ĉiuj organizoj pli-malpli publikaj de la "grandaj" landoj. Fakte estus malfacile kompreni, kial ili ne estus tiaj, konsiderante ke ili kreas tian situacion.

Iuj pensas ke oni eĉ devus akceleri la nunan proceson, kaj kuriozas rimarki ke inter ili multnombros la registaroj de la "gvidataj" landoj, kiuj sintenas tiurilate "pli registaj ol la reĝo" (memoru pri la proponoj en la sveda parlamento por plivastigi la instruadon de la angla eĉ en la unuajn jarojn de la baza lernejo; pripensu la agadlinion de la afrikaj anglaparolantaj kaj francaparolantaj elitoj rilate al siaj propraj samlandanoj, kiuj parolas ilian (sian) propran lingvon). Cetere, mi scias, ke la psikologio provizigas nin de konvinkaj klarigoj de tia kunlabora konduto.

Indiferentaj estas la plejmulto de la "homoj sur la strato", de la registaroj kaj de la politikaj partioj en preskaŭ ĉiuj landoj; pro tio, ke ili ne vidas la problemon. Eĉ la homoj, la registaroj aŭ la partioj, kiuj batalas kontraŭ aliaj diskriminmanieroj, pruviĝas speciale bonvenantaj kiam oni venas sur la punkto pri kultura imperiismo aŭ lingva imperiismo (la itala maldekstro estas eble tro facila ekzemplo, sed tre emblema).

Ekzistas ankaŭ, inter la marksistoj, tiuj, kiuj klopodas raciigi tian agadmanieron. Konklude, ili diras, tial ke kulturo kaj lingvo (kaj sekve ankaŭ la lingva-kultura imperiismo) apartenas al la superstrukturo, aŭ aliamaniere ili certe estas fenomenoj malpli gravaj rilate al la aliaj imperiismaj faktoroj (ekonomia, milita), ne meritas okupiĝi pri ili. Ĉio solviĝos, kiam la strukturaj problemoj estos solvitaj.

Laŭ ni evidentas, ke la aferoj ne estas tiom facilaj, ke la rilatoj inter strukturo kaj superstrukturo ne tiom mekanikas. Plue, se ĉio solveblus per la solvado de la kontraŭsensoj ĉe la produktado, kial de la problemoj pri naciismo kaj justaj internaciaj rilatoj ne solviĝas aŭtomate en la komunismaj landoj?

Kontraŭaj al la daŭrigado de la nuna situacio kaj al la serĉado de novaj solvoj, pli justaj, je la nivelo de internaciaj rilatoj, estas kelkaj diversprocedaj grupoj, kies agado ne estis ĝis nun kunordigita. Nome, temas pri iuj progresemaj registaroj de la evoluantaj landoj, pri grupoj, kiuj (precipe en Eŭropo) okupiĝas pri la problemoj de la etnaj minoritatoj, pri la esperantistoj, kaj pri kelkaj sociolingvistoj.

La precipa kontribuo de tiuj registaroj estas montri, ke jam ne plu eblas paroli pri "ne venkeblaj" malfacilaĵoj.

Ni nomu la ĵusan historion de Somalio, kie oni rapide adoptis la nacian lingvon kaj uzadas ĝin ĉiuokaze, kontraŭante multnombrajn homojn en Eŭropo, kiuj ĝuste tiam montradis, ke tio estos nebla, pro la manko da instruistoj, pro la grandega investo bezonata, pro la manko de somalilingvaj libroj, kaj tiel plu.

Ni nomu ankaŭ Alĝerion, Tanzanion, kaj Vjetnamon, kie oni pli aŭ malpli efike kaj rapide montris, ke la lokajn lingvojn oni povas uzi kaj revalorigi, ke tute ne nepras daŭrigi la uzadon de la eks-koloniasmaj lingvoj.

La aktivistoj por la eŭropaj etnaj minoritatoj okupiĝas pri la problemo interna al la diversaj minoritataj etnoj: la defendo de ĝiaj kulturoj kaj de ĝiaj lingvoj, minacataj per mortigo pli aŭ malpli urĝe; sed ili ankoraŭ ne ekpritraktis la problemojn pri la interetna komunikado. Sajnas al ni, ke oni nune akceptas la principon, ke la eŭskaraj parolu inter ili eŝkare, sed ke ili uzu la kastilian por paroli kun madridanoj, kaj senĝene la anglan por paroli kun la gaeloj.

La esperantistoj, finfine, meritas pro tio, ke ili estis la unuaj kaj ankoraŭ estas la ununuraj, kiuj sisteme batalas kontraŭ la lingva diskriminacio kaj ĉiu kultura imperiismo ĉe la internaciaj rilatoj. Ilia ebla limigo troviĝas je la punkto, ke ili okupiĝas pri la temo ne klare rigardante ties ligiloj kun la aliaj kondiĉigmanieroj de la povaj landoj kontraŭ la senpovaj. Rezume, ili diras, ke la lingva imperiismo (kaj de la kultura) venkeblas nur per la uzado de neŭtrala lingvo, kiu, pro ĝia sendependo de ĉia homarero, ne kapablas iĝi la ilo de tiu aŭ tiu ĉi mondpopo.

Fakte malfacilegas refuti tian argumentadon, almenaŭ logike, kaj ĝi feliĉe estas ĉiam malpli refutata. Oni povas, aŭ prefereble laŭ ni, oni devas, diskuti la teknikan flankon de la afero (kiamaniere disvastigi la internacian lingvon Esperanto transeŭrope, ekzemple en Ĉinio, Japanio aŭ Vjetnamo?), sed al niŝajnas ke la principo, sur kiu bazas la propono de la internacia-neŭtrala-lingvo-anoj, principo kiu rifuzas ĉian konsideron pri politika, ekonomia, aŭ milita povo de tiuj, kiuj parolas la lingvon uzendan internacie.

La solvo proponita de la esperantistoj ne estas, tamen, nur teoria. Internacia lingvo Esperanto aĝas jam 90 jaroj kaj estas jam sufiĉe provita je ĉiaj homaj okupiĝoj; ĝi skribeblas, paroleblas kaj radio dissendeblas kiel dua, helpa lingvo, kiel pruvas la tuttaga praktiko tramonde. Ĝi ankaŭ havas riĉegan verkaron, kaj originalan, kaj tradukitan, kaj kompreneble ankaŭ diversstilan presafaron.

Mi emas insisti je la ideo pri dua lingvo. Esperanto tute ne volas disputi kontraŭ naciaj lingvoj pri ilia vivloko; ĝi kontraŭstaras, male, la imponadon en la gvidataj ŝtatoj de la kulturo kaj la lingvo de la gvidantaj ŝtatoj. Esperantistoj, plue, ne kontraŭstaras la


instruadon pri fremdaj lingvoj; ili nur kredas, ke ĝi utilas nur por tiuj, kiuj ŝajnas taŭgaj je tia instruado, kaj kiuj volas trakoni la fremdajn literaturojn, historiojn kaj morojn, Nune, tutmale, la instruado pri la superreganta fremda lingvo rezultis el la kreado en pluraj gvidantaj landoj de peranta elektitaro (pli aŭ malpli konscie "Lunlahoranta") inter la gvidanta ŝtato kaj la amaso de samregnanoj, ne tiom privilegitaĵ.

Neniu ankoraŭ pripensis, escepte la esperantistoj, la problemon pri la amasa internacia komunikilo, facila je lernado kaj uzado, kiu li berigas tiujn amasojn de ĉiu unusensa kultura kondiĉigo.

Ni konkludas nian paroladon per la citaĵo pri la ideoj pri Esperanto de la svisa verkisto Edmond Privat: "Oni tute ne komparivas la uzadon de Esperanto kun tiun de fremdaj naciaj lingvoj. La uzado de tiuj ĉi tute ne naturas nek liberas. Fremduloj kutime sin esprimas honore kaj malkonfidentec, timante erari kaj ridindiĝi. Ni delasu la eksterordinaran okazaĵoj, kiam la fremda lingvo iĝas la tuttaĝan lingvon de enmigrinto. Esperante la homoj parolas multe pli libere kaj senĝene. Tial, ke ili ne parolas kun homoj, kies lingvon ili uzas, kiuj povas kontroli kaj moki ilin, ĉiuj kredas sin pli liberaj kaj egalaĵ. Tial ili ne hezitas esprimi iliajn sentojn kvazaŭ propralingve kaj vortoj eliras iliajn buŝojn pli fluaĵ, ekde ili ekalkutimiĝas je la uzado de la lingvo. Ili sentas sin majstroj de ilo kaj ne majstrigitaj de ilo. Tial Esperanto estas vivanta lingvo, dum la uzado de fremdaj lingvoj multe pli malproksimas la vivon kaj oftege enuigeĝas, malnaturas, troe "gramatikas" kaj tute ne spontaneas.

Finafine estas la uzado far de tiuj, kiuj daŭre parolas Esperanton, kio elfaras Esperanton, dum la uzado far de fremduloj de nacia lingvo senformigas ĝin, tute male. Jen elbaza diferenco. Dum la homoj sentas sin gastoj aŭ sklavoj de lernita fremda lingvo, ili sentas sin veraj majstroj de Esperanto".

Tradukita de Marteno  
Novembro 1977



# ATENCOJ

En la 33a IJK (Internacia Junulara Kongreso) de TEJO okazinta en Poitiers pasintan aŭguston, estis akordite en la Kongresa Rezolucio, sendi reprezentantojn de TEJO al la Internacia Kongreso de la Ligo de la Rajtoj de la Popoloj, okazunta en Barcelono ekde la 8a ĝis la 11a de decembro. Menciinde estas, ke la organizintoj de la Kongreso oficiale invitis TEJO-n partopreni plerrajte ĝin.

En tiu Kongreso, TEJO prezentintus la amendojn al la Internacia Deklaracio de la Rajtoj de la Popoloj, aprobitajn de la partoprenintoj en la laborgrupo pri tiu temo, okazinta dum la IJK.

Kvardek ok horoj antaŭ la komenco de la Kongreso, la hispana registaro ĝin malpermesis. Ĝi nun one kaŝokazis, tamen, unu el la TEJO-representantoj, Ludoviko de Yzaguirre (nia prezidanto) kaj observanta reprezentanto de HEJS, Martí Ruiz, ĝin partoprenis. En venonta bulteno ni plej amplekse raportos pri la okazintaĵoj.

Sekve, ni publikigas la oficialan komunikon de la organizantoj de la Kongreso.

## LIGO DE LA RAJTOJ DE LA POPOLOJ

### GAZETARA KOMUNIKO DE LA SEKRETARIEJO DE LA INTERNACIA KONGRESO DE LA LIGO DE LA RAJTOJ DE LA POPOLOJ

La Internacia Kongreso de la Ligo de la Rajtoj de la Popoloj, kiu devis okazi en Barcelono, ekde la 8a ĝis la 11a de Decembro, restis definitive suspendita. Hieraŭ, lia Moŝto, s-ro Civila Registro de Barcelono komunikis al ĉi-sekretariejo la malpermeson, argumentante "la malfavoran informon de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj". Hieraŭ posttagmeze kaj hodiaŭ matene, kelkaj katalunaj parlamentanoj, inter kiuj troviĝas la senatano Josep Benet, ligita, ekde ĝia fondiĝo, al la Ligo, la deputitoj Roca Junyent, Jordi Solé Turá, kaj ankaŭ la senatano Cirici i Pellicer, havis en Madrido kelkajn intervjuojn kun registaranoj cele al rekonsidero de la definitiva malpermeso.

Antaŭ tio, la Ligo de la Rajtoj de la Popoloj kaj la kunlaborantaj Ligoj en la Kongresorganizo, el Asturio, Galicio, Eŭskadio, Ekstremaduro kaj Kastilio decidis la suspendon de la Kongreso, evitante tiel ĉiusepecan kontraŭleĝan agon.

Tamen, ni volas manifesti ke malpermesante la kongreson oni transpasas rajtojn tiel fundamentaj kiel la esprim'kaj kunven'rajtojn, kaj ĉikaze estas pli surprizige ĉar ĝus la hispana registaro ratifikis la Deklaracion de Homaj Rajtoj, la Helsinkiajn Akordojn, kaj tiujn de la Eŭropa Konsilantaro.

Krom la Eŭropaj Delegacioj, kiel la Internacia Ligo, kaj la konataj gravuloj, kiel Lelio Basso, François Rigaux, Leo Matarasso, George Casalis, Gabriel García Márquez, Andreas Papandreu, Julio Cortazar, Laura Allende, Juan Bosch, Denis Payot, Albert Saboul kaj aliaj, ĉiuj membroj de la Internacia Ligo, estis invititaj kiel observantoj, reprezentantoj de popoloj de la tiel nomata Tria Mondo, kiuj nun luktas pro sia liberiĝo. Post tiom da jaroj dum kiuj la popoloj de la hispana ŝtato estis ricevintaj internacian solidarecon ekde for de niaj landlimoj, tiu Kongreso devintus esti pruvo de la kapablo -nun nebla- de nia popolo reciproke gastigi en libereceto, dum kelkaj tagoj, kiujn, en malfavoraj cirkonstancoj heroe luktadas kontraŭ la imperiismo kaj por la libereco.

Ni bedaŭras kaj protestas kontraŭ la registara nekomprenejo de nia iniciato, kaj ankaŭ kontraŭ la specialaj cirkonstancoj de tiu malpermeso, nur 48 horoj antaŭ la komenco de la Kongreso.

Ni dankas la Barcelonan Urbestraron, kiun ĉiunmomente konsciis pri la graveco havunta en ĉi urbo kaj en Katalunujo, la okazigon de la Kongreso. Estus la urbestrara helpo, krom aliaj, kiu ebligintus la disvolviĝon de la Kongreso.

La Ligo de la Rajtoj de la Popoloj havas antaŭ si enorman taskon por realigi kaj la registara malpermeso estas plua malhelpo kiun havas la tutmondaj popoloj por aŭdigi sian voĉon kaj atingi plej homan kaj justan sistemon, streĉiĝante la solidarecligilojn.

Kiel ni eksponis, la aktivaĵoj de la Kongreso, restis komplete suspenditaj, kaj en venonta kunveno de la diversaj Ligoj de la hispana ŝtato kaj de aliaj landoj, oni decidis la daton kaj ejon de la Internacia Kongreso, kaj tamen, ĉar multaj kongresantoj troviĝas jam en Barcelono kaj aliaj venos el tre malproksimaj landoj, ni okazigos kelkajn protokolajn aktivaĵojn kun ili kaj tiel laŭeble malgrandigi la finan ŝtaton kaŭzitan de la malpermeso de la hispana registaro.

**Artikolo 19.** Ciu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimo; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.

**Artikolo 20.** (1) Ciu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo.

(2) Neniu estu devigita aparteni al asocio.

*Kiam ĉi tiu bulteno estis finpreta por eniri la presejon, ni sciis pri la enkarcerigo de Albert Boadella, direktoro de la teatra trupo "Els Joglars" kiu estis tiam reprezentanta, kun ĉiuj bezonataj permesoj, la teatraĵon "La Torna" (La Kromdonajo). La demandintoj estas la militistoj, pretekstante fidiĵojn kontraŭ la armeo en la menciita teatraĵo.*

*"La Torna" temas pri la ekzekuto de la poldevena senpatrujulo Heinz Chez far la hispana reĝimo kune kun la kataluno Salvador Puig Antich, aktivulo de la Iberia Liberiga Movado (M.I.L.) la 2an de Marto 1974.*

*Post la sciigo de la enkarcerigo, preskaŭ ĉiuj spektakloj el Barcelono, Madrido kaj aliaj urboj el la hispana ŝtato solidarece strikas. La spektakllaboristoj de Barcelono decidis en asembleo striki ĝis la liberigo de Albert Boadella. Ili petis la solidarecon de aliaj kulturaj asocioj, kaj tial, ni, komprenante ke ĉi aresto kontraŭstaras la esprimliberecon, difinita en la Deklaracio de Homaj Rajtoj, antaŭ ne multe subskribita de la hispana registaro, esprimas ĉi tie nian kondamnonal tiu arbitracia aresto, petante la liberigon de Albert Boadella, krome ni solidarecas kun la strikantoj, kaj petas al la legantoj, komprenemon kaj kunlaboron cele al bonŝolvo de tiu atenco.*

LA REDAKCIO





SINJORO,  
LA RUGA  
ALARMO SONIS  
REFOJE.

KIO OKAZAS  
KAPORALO?

KIO?!



JES, SINJORO, SAJNE RESTAS  
VIVA ANKORAŬ UNU EL TIAJ  
BESTOJ...

NI DEVAS  
AVERTI LA CENTR-  
ALON POR KE ILI  
INFORMU LA  
KOMANDEJON.


PK-PK-PK-PK

SEKCIO J-27

POST 3 JAROJ  
DA KVIETO, JEN REE  
TIU INKUBO.

# LA CASO

TEKSTO KAJ DESEGNOJ:  
V. BARBA PIZARRO  
TRADUKO FAR : TAO







ESTIS VERE, JES  
VERE... UNU,  
RESTAS UNU...

DIABLE!  
LI NE VIDI-  
ĜAS.



TRANKVILIĜU KNABO  
KAJ ĜVATU ATEnte.  
PERDA LA KVIEtoN  
ESTAS DANGERE.

HE! JES  
JES...



LI ESTAS AMARULO, SED EN TIAJ  
OKAZOJ LI ELMONTRAS KIOM LI  
VALORAS. MI ADMIRAS LIN.  
MI NE VOLAS PENSI KIO OK-  
AZUS SE MI ESTUS SOLA EN  
ĜI ARBARO.



DOMAĜE, LA KOM-  
PATINDA BURK PORTIS LA TELEKO-  
MUNIKILON KAĜ NUN ĜI ESTAS DE-  
TRUITA... KELKFOJE MI PENSAS  
KE TIUJ BESTOJ HAVAS PLI DA  
INTELIĜENTO OL NI ĜIUJ  
KREMAS.

... KE VI TRALEGU ATENTE TION:

- PRO DIVERSAJ KIALOJ, PRESEJO, PERDIĜO DE ORIGINALOJ, KTP., NE EBLIS APERIGI LA 3an, 4an KAJ 5an HEJS-BULTENOJN. NI BEDAŬRAS TION EGE, KAJ PETAS AL LA LEGANTARO SINCERAN PARDONON. KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ, NI, KROM LA 107a NUMERO, SENDOS AL VI SPECIALAN NUMERON ENHAVANTAN LA MATERIALON DE TIUJ TRI NEAPERINTAJ NUMEROJ. DANKON PRO VIA KOMPRENEMO KAJ DENOVE PARDONU NIN.
- ĈI NUMERO ESTAS SENDITA KONTRAŬPAGE AL TIUJ KIUJ ANKORAŬ NE PAGIS LA ĈI-JARAN KOTIZON. BONVOLU, NE RESENDU LA BULTENON, ĈAR NIA BUDĜETO TUTE NE PERMESAS TION. DANKON.
- NI GRATULAS LA VALENCIAN JUNULARAN GRUPON, KIUN PLIGRANDIĜIS. BONVENON AL LA NOVAJ MEMBROJ.
- TRALEGU KAJ STUDU LA STATUT-PROJEKTON, KAJ TUJ SENDU AL NI LA AMENDOJN, SE VI KONSIDERAS TION OPORTUNA. HEJS ESTAS ANKAŬ VIA. KUNLABORU!
- KELKAJ EL LA ESTRARANOJ DE HEJS FORLISIS SIAJN POSTENOJN, KAJ ALIAJ ENESTRARIĜIS. ILI ESTAS JENAJ:
  - SEKRETARIO: HÈCTOR PUIG
  - KASISTO: ANTONIO LINARES
  - GRAFIKISTO: RAFAEL CELADA
- LA ESTRARO KAJ LA REDAKCIO DE HEJS DEZIRAS AL LA MEMBRARO KAJ LEGANTOJ FELIĈAN NOVAN JARON.